


*Bisiac* estas la venetia dialekto parolata en tiu areo, kies nomo havas originon ankoraŭ ne tute certan: laŭ la plej verŝajna hipotezo ĝi devenas el la slava termino *Bezjak*, signifanta "fuĝinto", "ekzilito".

*Bisiacaria* estas facile atingebla per:

- Aŭtoŝoseo A 4 (elirejoj *Redipuglia* e *Monfalcone Lisert*)
- Ŝtata strato 14 (*Trieste-Venezia*)
- Fervojaj linioj (*Trieste-Udine* kaj *Trieste-Venezia*)  
Flughaveno Friulo Juli-Venetio (*Ronchi dei Legionari*)



Diversspecaj estas la kialoj kiuj instigas al vizito: artaj, naturalismaj, vin-gastronomiaj k.a. Jen kelkaj ekzemploj: la arkeologiaj restaĵoj de *San Canzian d'Isonzo*, la fortikigitaj pravilaĝoj karstaj (*castellieri*), la fortikaĵo de *Monfalcone*, la tranĉeoj de la Unua Mondmilito, la monumenta milita tomba sanktejo de *Redipuglia*, la natura oazo sur la *Isola di Cona* ĉe *Staranzano*, la karsta pejzaĝo de *Sagrado* ĝis la rivero *Timavo*, la ŝipkonstruejo por la plej grandaj krosadŝipoj en la mondo, la naturaj parkoj laŭlonge de *Isonzo* kaj ankoraŭ la kamparo kun ĝiaj vilaoj kaj parokoj (*Turriaco*, *Ronchi dei Legionari*, *San Pier d'Isonzo*) kaj, por malstreĉiga paŭzo multnombraj kamparaj gastejoj kaj la tipaj sezonaj vingustumejoj.



REGIONE AUTONOMA  
FRIULI VENEZIA GIULIA



**Gruppo Costumi Tradizionali Bisiachi**

Piazza Libertà, 34 I-34070 Turriaco GO  
Tel.: 0481.767276

[www.costumibisiachi.it](http://www.costumibisiachi.it) e-mail: [costumibisiachi@libero.it](mailto:costumibisiachi@libero.it)



***Bisiacaria*** estas la teritorio en la provinco de *Gorizia*, inter Karsto kaj Adriatika Maro, limigita oriente kaj okcidente respektive de la riveroj *Timavo* kaj *Isonzo*. Apartenas al ĝi la komunumoj *Fogliano-Redipuglia*, *Monfalcone*, *Ronchi dei Legionari*, *Sagrado*, *San Canzian d'Isonzo*, *San Pier d'Isonzo*, *Staranzano*, *Turriaco*, kun sume ĉ. 60.000 loĝantoj.

## La Grupo Tradiciaj Kostumoj

## Pupa de straz (ŝtofa pupo)

La Grupo Tradiciaj Kostumoj, starigita kiel formala Asocio en decembro 2000, aktivis en la regiono ekde la jaro 1991, sekve de la prezentado de studo pri la tipa virina kostumo fare de Marina Dorsi kadre de la Kultura kaj distra rondo "Don E. Brandi" de *Turriaco*.

La Grupo, kies sidejo troviĝas en *Turriaco*, havas la honoron reprezenti la regionon dum multaj oficialaj eventoj en Italio kaj eksterlande.

Ĝi antaŭenpuŝas la konon de la tradicioj kaj de la dialekto *Bisiac* kaj la teritoriajn apartaĵojn pere de plej diversaj kuturaj kaj folkloraj aktivecoj, prituŝante la organizadon de temaj ekspozicioj, partoprenon okaze de paradoj, turisman plivastigon, okupiĝon de la gastoj en la maljunulejoj, realigon de manlaboraĵoj, altiron de la publika interesiĝo pri la volontula servo ĉe la lernejoj.

**La tradicia kostumo** antaŭfiksas tri inajn modelojn kaj unu viran por plenkreskuloj kaj infanoj, realigitajn zorge kun aparta atento al la tradicia moro.

La tri virinaj modeloj atestas tri diversajn epokojn: je la fino de la 16<sup>a</sup> jarcento originas la robo kun korsajo; de la dua duono de la 19<sup>a</sup> jarcento estas la plej popola robo kun franĝita fulardo surŝultre; tipa de la fino de la 19<sup>a</sup> jarcento, kun videblaj influoj el la tiutempa modo, la modelo kun jaketo butonfermita dorse.

Tiuj modeloj havas komunajn trajtojn: larĝan krispigitan jupon, protektitan de antaŭtuko kaj lignoŝuojn aŭ pantoflojn el malhela ŝtofo. Tipa estas la maniero surmeti la kaptukon, fiksante ĝin pere de pinglego tiel ke la orloj restu liberaj.

Ĉe la vira kostumo, la ĝisgenuajn aŭ ĝismaleolajn pantalonojn akompanas ŝtofa veŝto, surmetita sur blanka ĉemizo kun speciale farita kolumo. Kompletigas la veŝton ĝisgenuaj ŝtrumpoj el kruda lano, lignoŝuoj aŭ pantofloj kaj ĉapelo.

Tipaj akcesoraĵoj estis la vimenkorbo, mane realigita, kaj la ombrelo el nigra kotono.

**Pupa de straz (ŝtofa pupo)**

La pupo el ŝtofo, manrealigitaj ekskluzive de la Grupo Tradiciaj Kostumoj, reproduktas fidele la tradician pupon. Ĝi surhavas la tipan kostumon en siaj diversaj versioj, kompleta je akcesoraĵoj, kaj, kiel en la pasinteco, ĝi estas komplete mankudrita por ke ĉiu unuopa ekzemplero estu unika dank' al la detalemo de la realigo. Ĉiu pupo estas numerigita kaj provizita per la registrita marko de la Grupo.



**Bisiacaria** estas interesa ankaŭ pro siaj manĝaĵoj laŭ centreŭropa gusto kaj pro la vinoj kiujn oni povas gustumi en la multnombraj trinkejoj, sed ankaŭ dum la popolfestoj (kermesoj) kiuj donas la eblecon malkovri la tradician gastronomion.

Diversaj manifestacioj tre konataj nacinivele okazas en la vilaĝetoj de *Bisiacaria*. la pli ol jarcenta Karnavalo de *Monfalcone*, la historiaj memoradoj pri la Unua Mondmilito en Karsto, la festo, je la 4a de novembro, okaze de la datreveno de la Nacia Unuiĝo en *Redipuglia* dum kiu paradas la akrobata aviadila patrolo "Trikoloraj sagoj", la imponaj lanĉoj de krozadŝipoj en *Monfalcone*, sen forgesi la nenombreblajn lokajn festojn, el kiuj kelkaj sin gloras je jarcenta tradicio.

**La vinoj:*****Bianc Bisiac kaj Nigra Bisiac***

Inter la propagandaj iniciatoj de *Bisiacaria*, elpensitaj kaj prizorgitaj de la Grupo, aperas ankaŭ la disvastigo de la vino produktita en tiu teritorio kaj selektita por la registrado de la markoj. Danke al la kunlaboro de la artistino *Marina Legovini* el *Monfalcone*, estis realigitaj la etikedoj.

La oficiala prezentado, fare de la agronomo *Claudio Fabbro*, okazis dum konferenco kadre de la inaŭguro de la vina Festo en *Monfalcone* la 13<sup>an</sup> de junio 2007.

[www.regione.fvg.it](http://www.regione.fvg.it)  
[www.provincia.gorizia.it](http://www.provincia.gorizia.it)  
[www.bisiacaria.com](http://www.bisiacaria.com)  
[www.territori.it](http://www.territori.it)  
[www.ccm.it](http://www.ccm.it)  
[www.acbisiaca.it](http://www.acbisiaca.it)  
[www.wavenet.it/bisiachi](http://www.wavenet.it/bisiachi)  
[www.artebisiaca.com](http://www.artebisiaca.com)  
[www.isontino.com](http://www.isontino.com)  
[www.panorami\\_bisiacaria.too.it](http://www.panorami_bisiacaria.too.it)  
**[www.costumibisiachi.it](http://www.costumibisiachi.it)**